**N I A V O Ĉ O**

**Madrida Esperanto-Liceo**

San Alejandro 6-4ºB-Ext. 28005 Madrid

(Nur poŝta adreso)

Ni kunvenas lunde je la 18,30 en Rodríguez San Pedro 13-3º-7

Redaktas kaj eraras: Lupe Sanz **APRILO 2000**

Nia Voĉo estas legebla en internet ĉe la TTT-paĝo de Andaluzia Esperanto Unuiĝo:

http://www.ciudadfutura.com/esperanto

# 59-a HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO- HEF KONGRESO

**29a Aprilo ĝis 1a de Majo 2000. San Sebastián de los Reyes (Madrid)**

*Informoj ĉe:* www.esperanto-es.org/kongreso/inicio.htm:

KOTIZOJ EŬROJ (PESETOJ)

Ĝis la fino de marto aligxis 50 esperantistoj.

| Kategorioj | post 1a de marto |
|---|---|
| **HEF-ano** | **39 (6.489)** |
| **Ne HEF-ano** | **45 (7.487)** |
| **Juna HEF-ano** | **27 (4.492)** |
| **Juna ne HEF-ano** | **33 (5.490)** |

1.- Pagu vian kotizon al- Caja Postal: 1302-0116-51-0024189825

2. Sendu la pagpruvilon kun viaj datumoj al oficejo de HEF.

Sabate ekde la deka funkcios la akceptado. Je la 11a okazos la malfermo kun prelego de reprezentanto de Amnestio Internacia (en hispana, kun samtempa traduko en E-on). Kaj lunde post la tagmeza bankedo okazos samtempe kvizo gvidata de Adúriz kaj ia ateliero, kaj je la 18:30 la fermo kaj kritika rondo. Marde matene, okazos vizito al la muzeo El Prado. gvidata de Miguel Fernández.

La plej aktiva organizo pledanta por la homaj rajtoj en la mondo, Amnestio Internacia, prezentos la ĉefajn trajtojn de sia nuna kaj estonta agado per la prelego de **Eva Suárez-Llanos**, anino de la Federacia Komitato de la hispana branĉo de Amnestio Internacia. Profitinda ŝanco por la dialogo inter du similcelaj organizoj.

La Urbestro de SSR, Moŝta **S-ro Ángel Requena Fraile**, bonvenos la kongresanojn dum la inaŭguro. S-ro Requena montris alifoje sian simpation al esperanto, tial lia ĉeesto estos aparte aprecata.

Kial ne ekszistas verdaj steloj?. Per tiu provoka demando la elstara astronomo, **David Galadí Enríquez**, titoligos sian ĝuindan prelegon ene de la programo de la Kongreso. David Galadí estas distrema diskoniganto Sciencon, verkisto de la libro "A ras de cielo" (Ĉielen), kiu jam amuzis la ĉeestintojn de la antaŭa Kongreso en Castellón.

Ĉiuj kongresanoj ricevos jenajn donacojn: libreto "Pro esperanto", globkrajono (propagandilo pri esperanto), turisman informbroŝuron en esperanto (Madrido kaj sia monumenta ĉirkauaĵoj), kaj mapojn pri Madrido kaj San Sebastián de los Reyes.

La urba gazeto de San Sebastián de los Reyes "La Plaza de la Constitución" 1a-15a de februaro, anoncas, en ĝia unua paĝo, la venontan kongreson de esperanto, kaj aperos alia artikoleto antaŭ la kongreso mem.

## EKSTERLANDE

2a Kongreso de la Eŭropaj Verdaj Partioj. Parizo, Cité de la Science, 1999-02-26/28

Resolucio rilate Esperanto: La internacia lingvo Esperanto devus esti elektebla kiel opcio en eŭropaj lernejoj, ĉar ĝi estas neŭtrala kaj facile lernebla. La internacia lingvo Esperanto devus iĝi unu el la oficialaj lingvoj de la EP-/EU-sistemo kiam la principo de la "egalrajteco de la lingvoj" devas esti haltigata.

Fine de aprilo en Oostende (Belgio) okazos 4-a Europ-Unia Esperanto-Kongreso. La reĝo Alberto la 2-a estas alta protektanto. Rafaela Urueña kaj Luis Hernández reprezentos al HEF.

## NIA VOĈO APRILO 2000 1999

HISPANIO

La libro "Esperanto en prospektivo" de G.Moya estos tradukita al la korea lingvo. Korea E-asocio decidis disvastigi "la internan ideon" de Zamenhof.

Je la komenco de aprilo okazas la **Valencia-Murcia kongreso de Esperanto** en Requena.

La du prelegoj oficialaj estas: "Konsiloj al memlernantoj", far Juan Antonio Giménez García kaj "Prezentado de nova kurso de Esperanto en CD-rom", far la aŭtoro, Francisco Muñoz Garre.

ESPERANTO EN INTERRETO

Kunlabore de Vincent Charlot, Kalle Kniivilä kaj Alberto Fumero, la gazetaraj komunikoj de UEA ekaperas en la hispana. Dezirantoj ricevi ilin sendu sentekstan mesaĝon al <esperanto-noticias-subscribe@egroups.com>

"Europa Bulteno" estas sendependa esperantlingva ret-bulteno por informado kaj debato pri Eŭropa Unuiĝo. Kiu deziras ricevi ret-skribu al <u.broccatelli@tiscalinet.it>

ESPERANTO EN AMASKOMUNIKILOJ

La vendreda suplemento de ABC "Guía de Madrid" 2000-03-03 publikigis, en la sekcio "Cursos" anoncon pri la koresponda kurso de HEF.

**Jose Millás**, nuntempa hispana romanisto, mencias esperanton en sia ŝajne lasta verko **"No mires debajo de la cama"**. La mencio temas pri familio, kun filoj, ĉe kiu esperanto estas parolata.

VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO

Ni kunvenas, lunde ekde la 18.30 h en RODRÍGUEZ SAN PEDRO 13-3º-7 Tel. 91 446 80 79.

Kursoj: Centro de Día Puente de Toledo. Mercedes Arteaga 18. Por triaaĝuloj.
Universidad Autónoma de Madrid. Lunde kaj merkrede 12-13h.
Informas Marco Trevisán 915 617 613 <oxartum@esperanto.nu>

Prelego: 17a aprilo. 19.00 h "Expolingua-2000. Lingva montrofenestro"

HEF ANGULO

Lunde kaj ĵaŭde (18,00 ĝis la 20,30 h) funkcias HEF-CO (Rodríguez San Pedro 13-3º-7). Aliajn tagojn kaj horojn uzu aŭtomatan respondilon aŭ fakson 91 446 80 79. Ankaŭ e-poŝto: admin@esperanto-es.org

HEF petis subvenciojn, al Ministerio pri Edukado kaj Kulturo, por parto de la buĝeto de la Hispana Kongreso kaj la partopreno en Expolingua-2000. La solvon... post majo. Por la samaj projektoj ankaŭ petis monan helpon al Caja Madrid kaj Fundación Esperanto.

De la 6a ĝis la 9-a de aprilo okazos EXPOLINGUA-2000. HEF ankaŭ ĉi jare partoprenos ĝin. Nia stando, kun la nomo "Esperanto", estas la 63A. Ni ne povas maltrafi la okazon aperi je la sama nivelo ol la ceteraj lingvoj kaj moviĝi en profesiaj prilingvaj rondoj. Plie ni havas rektan kontakton kun la publiko kaj niaj informoj atingas, en nur kvar tagoj, pli da homoj ol dum la tuta jaro.

# KIEL ALVENI / *CÓMO LLEGAR*

**Aŭte:**
De Madrid, ŝoseon N- I (de Madrid al Burgos).
Elirejo numero 19 (Alcobendas- San Sebastián de los Reyes).
Unua destren en Avenida de los Pirineos. Rekten.
En dua trafikplaco, ĉi-strato iĝas Avenida Montes Urales. Rekten.
En unua trafikplaco, la strato eknomiĝas Avenida Tenerife. Rekten.
En la unua trafikplaco turnu maldekstren. Rekten.
En la sekva trafikplaco, la strato iĝas Avenida de Aragón; plu sekvu
En la dua trafikplaco iru maldekstren kaj eniru la straton Avenida Ro[illegible] de Luxemburgo. Iru rekten.
La tria strato je la dekstra flanko estas Avenida Federico García Lor[illegible] kie situas la kongresejo.

***En coche:***
*Desde Madrid, carretera N- I (Madrid - Burgos).*
*Salida número 19 (Alcobendas- San Sebastián de los Reyes).*
*Tomar la primera a la derecha en Avenida de los Pirineos. Recto.*
*En la segunda glorieta, esta calle cambia de nombre: Avenida Montes Urales. Recto.*
*En la primera glorieta, la avenida pasa a llamarse Avenida Tenerife. Recto.*
*En la primera glorieta girar a la izquierda. Seguir recto.*
*En la siguiente glorieta seguir de frente; esta calle vuelve a cambi[illegible] nombre para llamarse Avenida de Aragón; seguir recto.*
*En la segunda glorieta girar a la izquierda para coger la calle Aven[illegible] Rosa de Luxemburgo. Seguir recto.*
*La tercera calle a la derecha es la Avenida Federico García Lorca, [illegible]de se encuentra la sede del congreso.*

### KONGRESBUSA I[illegible]ERO

| | |
|---|---|
| 9:00 | Glorieta Carlos V (Atocha), Ministerio de Agricultura |
| 9:10 | Plaza de Castilla, tura akvujo |
| 9:17 | "Camping Madrid" |
| 9:27 | Hotel "Grand Prix" |
| 9:35 | Hostal "Arba" (Stratangulo de "Viuda de Aldama" kaj "Aven[illegible]ia de España<br>Pli precize, cxe la faŝado de "Spejos Peluqueros") |
| 9:40 | "Centro Municipal de Servicios" (stratangulo de "Av. Loma[illegible] del Rey" kaj "Federico Gª Lorca." |

Rimarkoj:
1. La sabaton 29a povas ekesti trafikproblemoj, kaj eventuale la [illegible]mpoindikoj ne alĝustiĝos.
2. La kongresbuso apartenas al la entrepreno "Alonso e hijos"; [illegible]ortos ian videblan kaj rekoneblan identigilon.
3. Ekde la unua haltejo estos iu kunlaboranto el la organiza skip[illegible]
4. Revena starto je la 20ª. Samaj haltoj.

### *ITINERARIO DEL AUTOBÚS DEL CONGRESO*

| | |
|---|---|
| *9:00* | *Glorieta Carlos V (Atocha), Ministerio de Agricultura* |
| *9:10* | *Plaza de Castilla, depósito de agua* |
| *9:17* | *"Camping Madrid"* |
| *9:27* | *Hotel "Grand Prix"* |
| *9:35* | *Hostal "Arba" (Esquina de "Viuda de Aldama" con "Avenida de España<br>Más exactamente, en la fachada de "Spejos Peluqueros")* |
| *9:40* | *"Centro Municipal de Servicios" (Esquina de "Av. Lomas del Rey" con "Federico Gª Lorca."* |

*Advertencias:*
1. *El sábado 29 puede haber dificultades circulatorias, y quizá los tiempos se dilaten.*
2. *El autobús pertenece a la empresa "Alonso e hijos"; llevará algún distintivo visible y reconocible.*
3. *Desde la primera parada irá alguien de la organización.*
4. *Regreso a las 20 horas con las mismas paradas.*

NOTO / *NOTA*

Se via intenco estas uzi la kongresbuson, bv. komuniki al la organizantoj kie vi logxos kaj en kiu haltejo vi prenos gxin. Dankon.

*Si vas a utilizar el autobús del congreso, por favor informa a los organizadores de dónde te vas alojar y en qué parada lo vas a tomar. Gracias*

# 59-a Hispana Esperanto-Kongreso

## Provizora programo

| Tago | de | gxis | ejo | Programero | Kontribuanto | lingvo |
|---|---|---|---|---|---|---|
| sáb | 9:45 | | | ****** Alveno de la kongresbuso ****** | | |
| sáb | 10:00 | 10:45 | | Akceptado | | |
| sáb | 11:00 | 11:30 | 0 | Malfermo | | eo+es |
| sáb | 11:30 | 12:15 | 0 | El trabajo de Amnistía Internacional: Retos de los derechos humanos para el siglo XXI | Eva Suárez-Llanos | es>eo |
| sáb | 12:30 | | 2 | Estrakunsido de HEF | | eo |
| sáb | 13:00 | 14:30 | 1 | Curso de esperanto | | es+eo |
| sáb | 13:30 | 14:30 | 0 | Nuntempaj esperanto-poetikoj | Miguel Fernández | eo |
| sáb | 14:30 | 17:00 | | (.......................) | | |
| sáb | 17:00 | 18:00 | 0 | Kial ne ekzistas verdaj steloj? | David Galadí | eo>es |
| sáb | 17:00 | 18:30 | 2 | Ateliero pri paperfaldarto | David Trigo | es+eo |
| sáb | 17:45 | 18:45 | 1 | Vojoj el la konfliktoj - traktado de aliaj opinioj | Sabine Trenner | eo |
| sáb | 18:45 | 19:45 | 0 | Esperanto kaj interpretado | Jorge Camacho | eo>es |
| sáb | 20:00 | | | Foriro de la kongresbuso | | |
| sáb | 21:00 | | | Nokta promenado urba | Ana Manero | es+eo |
| dom | 9:45 | | | ****** Alveno de la kongresbuso ****** | | |
| dom | 10:00 | 10:45 | 0 | Paclaboro en Bosnio post la milito | Sabine Trenner | eo>es |
| dom | 11:15 | 12:15 | 0 | Criterios históricos de defensa de la lengua | Amelia Fernández | es>eo |
| dom | 11:30 | 12:30 | 2 | Ateliero pri dancado | Iván Manso | es+eo |
| dom | 12:20 | 13:20 | 2 | Kunsido de Fundación Esperanto | | eo+es |
| dom | 13:00 | 14:30 | 1 | Curso de esperanto | | es+eo |
| dom | 13:30 | 14:30 | 0 | Nuntempaj esperanto-poetikoj | Miguel Fernández | eo |
| dom | 14:30 | 17:00 | | (.......................) | | |
| dom | 17:00 | 18:00 | 0 | Partopreno de HEF en Expolingua | Miguel Ángel Sancho | eo |
| dom | 17:00 | 18:00 | 1 | Vojoj el la konfliktoj - traktado de aliaj opinioj | Sabine Trenner | eo |
| dom | 17:00 | 18:00 | 2 | Literatura ateliero | Jorge Camacho | eo |
| dom | 18:30 | 18:50 | 0 | Surprizo | Sabine Trenner | eo>es |
| dom | 19:00 | 19:50 | 0 | Koncerto de elektronika muziko | Eduardo Vargas "Solo" | |
| dom | 20:00 | | | Foriro de la kongresbuso | | |
| dom | 21:00 | | | Nokta promenado urba | Ana Manero | es+eo |
| lun | 9:45 | | | ****** Alveno de la kongresbuso ****** | | |
| lun | 10:00 | 10:15 | 0 | Premio Klara Silbernik | | eo |
| lun | 10:00 | 11:15 | 2 | Ateliero pri perlumado | David Trigo | es+eo |
| lun | 10:15 | 11:15 | 0 | Esperanto kaj Interreto - Prezento de HEF-retpagxoj | Miguel Ángel Sancho | eo |
| lun | 11:30 | 13:15 | 0 | Junta general de socios de la FEE | | es+eo |
| lun | 11:30 | 13:15 | 2 | Ateliero pri dancado | Iván Manso | es+eo |
| lun | 13:00 | 14:30 | 1 | Curso de esperanto | | es+eo |
| lun | 13:30 | 14:30 | 0 | Nuntempaj esperanto-poetikoj | Miguel Fernández | eo |
| lun | 13:30 | 14:30 | 2 | UK en Bilbao | Miguel García Iturrioz | eo+es |
| lun | 14:30 | 17:00 | | (.......................) | | |
| lun | 17:00 | 18:15 | 0 | Kvizo | Miguel Gutiérrez Adúriz | eo+es |
| lun | 17:00 | 18:30 | 2 | Ateliero pri jxonglado | David Trigo | es+eo |
| lun | 18:30 | 19:30 | 0 | Kritika rondo | | eo+es |
| lun | 19:30 | 19:45 | 0 | Fermo | | eo+es |
| lun | 20:00 | | | Foriro de la kongresbuso | | |
| mar | 10:00 | 11:15 | | Vizito al la muzeo El Prado | Miguel Fernández | eo+es |
| mar | 14:00 | | | Caldereta popular en la Dehesa Boyal | | |